



Go-Amiko

**Informilo de
Japana Esperantista Go-Asocio
N-ro 144, Aŭgusto 2015**



Go-ludoj dum la UK en Lille



La 25an de julio (sabate) okazis Movada Foiro, en kiu ni montris go-ludon. 10 ekzempleroj de nia revuo tuj elĉerpiĝis. S-ino Olga Shiliaeva (Rusio) kaj s-ro Nakajima Akacuki (Japanio) ludis go-on.

Ni ne havis kunsidon de go-ludoj, sed anstataŭe ni “malfermis” go-ludejon en la komuna salono Michaux, kie homoj libere kolektiĝis por babili, manĝi kaj eĉ dormeti. Jen estas du fotoj: en la maldekstra foto vidiĝas maldekstre malantaŭe s-ro Jose Maria de Jesus (Orienta Timoro) kaj dekstre s-ro Hori Jasuo (Japanio), kaj maldekstre antaŭe estas s-ro Nakacu Masanori (Japanio) kaj s-ro Georgo (Jerzy) Handzlik

(Pollando). En la dekstra foto estas s-ro Christoph Klawe (Germanio) kaj Georgo (Pollando).



Internacie

XXII-a Esperantista KGS-Turniro (Fino)

Denove estas la plej bona rezulto de nia turniro, ke ĉiuj partioj estas luditaj! Nia turnirgajnanto ĉi-foje estas ESPERANTO kun 5:0 - koran gratulon! Je la dua loko estas Algiskas kun 4:1, kaj sur la 3-aj lokoj estas russ, esgo kaj Javaharlal. Ne forgesu, ke la ludantoj ĉe la pinto de nia turnirlisto devis ludi refoje malfacilajn partiojn kun parte granda nombro de handikapŝtonoj. Pro tio mi kiel ĉiam aranĝis tabelon de la "veraj potencoj".

La fina turnirtabelo de nia XXII-a turniro (3...7/2015)

1	Cortex IID	-3	-2	+5	-4	-6	1
2	Morikin IID	-4	+1	+6	-5	-3	2
3	ESPERANTO 2K	+1	+4	+7	+8	+2	5
4	Russ 4K	+2	-3	-10	+1	+7	3
5	Esgo 5K	+10	-6	-1	+2	+9	3
6	Algiskas 6K	+8	+5	-2	+9	+1	4
7	Nikopipe 8K	+9	-8	-3	+10	-4	2

8	Javaharlal 8K	-6	+7	+9	-3	+10	3
9	Dodosan 10K	-7	-10	-8	-6	-5	0
10	Hegedusi 10K	-5	+9	+4	-7	-8	2


La tabelo de la "veraj potencoj"

(2-a kolumno: nomo kaj grado; 3-a kolumno: elirpoentoj laŭ grado; 4-a: gajnitaj partioj; 6-a: finrezulto)

1	Morikin IID	21	2	23
	Esperanto 2K	18	5	23
3	Cortex IID	21	1	22
4	russ 4K	16	3	19
5	esgo 5K	15	3	18
	Algiskas 7K	14	4	18
7	Javaharlal 8K	12	3	15
8	nikopipe 8K	12	2	14
9	Hegedusi 10K	10	2	12
10	Dodosan 10K	10	0	10

Mi jam tre ĝojas, revidi Vin en la nova, la XXIII-a turniro fine de aŭgusto! Ĝis tiam ĉion Bonon!

Via Matthias / esgo <esperanto-suedharz@gmx.de>



La solvo troviĝas en la 14a paĝo.

Japanio

Go-konkurso en Esperanto-Domo de Jacugatake

Go-konkurso en Esperanto-Domo de Jacugatake okazis la 23an-24an de majo 2015 kaj en ĝi partoprenis 7 homoj. La partoprenantoj estis s-ro Sakurai (8a dano) el Jamanaŝi, s-ro Akiba el Nara (7a-dano), s-ro Kaĵi el Kioto (5a dano), s-ro Mori el Ŝiga (3a dano), s-ro Hori el Gunma (3a dano), s-ino Mori el Osaka (2a kju) kaj s-ino Ooŝima el Tokio (6a kju). La unuan premion gajnis s-ro Akiba (6 venkoj), la duan, s-ro Mori (4 venkoj kaj 2 malvenkoj) kaj la trian, s-ro Sakurai (3 venkoj kaj 3 malvenkoj).

Je la 9a vespere s-ro Mori kaj Matthias de Germanio ludis go-n en komputilo, kaj ĉiuj membroj rigardis ĝin. Matthias gajnis la ludon. Vere interreta epoko estas mirinda.

